

Christian Felix Weiße,

La kontenteco

tradukita de Manfred Retzlaff

Trankvile, milde sentas mi
 La vivoĝojn sen ĉagreno.
 Senĝene lumas tie ĉi
 Bonvenon la mateno.

Kontentas, gajas mia kor',
 Ĝi daŭre batas melodie.
 Agrabla estas la dolor',
 Se ploras mi pasie.

Priridas mi ja ĉiujn ĉi
 Heroojn, sangverŝantojn, princojn.
 Pri mia dom' kontentas mi,
 Bezonas ne provincojn.

Ja furiozas kontraŭ si
 La grandsinjoroj kvazaŭ-diaj.
 Sed ĉu bezonas ili pli
 Da spac' en tomboj siaj?

*Traduko de la Germana poemo "Die Zufriedenheit" de CHRISTIAN FELIX WEISSE (*1726-01-28 – †1804-12-16) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2014-08.*

Arg-1086-2188 (2014-08-27 13:47:43)

Tiu ĉi poemo estas trovebla ankaŭ en http://www.gedichte-lyrik-poesie.de/Weisse_Die_Zufriedenheit/index.htm.